

Nova provo

Organo de NOVO, Asocio por Komuna Ellaborado de Lingvo Internacia
Numero 3

Julio 1992

Conantos de la prireformas vercos de Zamenhof eble memoron lia komento, ce tio cio unue aspectan teorie bona povan montrizi pose nepractica. Same ciel estin tiam che la supersignos i Zamenhof, povan esti nun che Novo i mes [me + plurala -s; =ni]. La ideo pri comuna ellaborado de lingvo internatia ya aspectin bona, i mes comensin la agado provante a zi realigi. Sed nun venan la malfasilo: chu vere eblan efectivigi mesa ideo, o chu tiu atingo eston fine neebla? Omnu practicanta lingvoreformanto frontan la problemo, ciel scribi en lingvo ciu ne existan, ciu estan iel nur fantazia imago. Concretigi tius imagos, esprimi los por comunicari al alias homos cun ideos similas (i nolsimilas), alveni al interconsentita formo, acseptigi lo che exterulos, i chio cetera . . . yen ya nolfasilega tascaro, cun videble pli da shanso por nolsucseso ol por la contro.

Mes tamen adigan la provo – en la nuna comens-puncto cun nur dec kvar membros (viden la listo sur pajo 19), sed cun celcas observantos i credeble pluras venontas interesatos. Restan al mes i al la estontas membros susesigi mesa intercomunico, interalie per preparo de proponos por comuna considero. Mes plu scriben contribuajos por Nova provo, sed ance faren spesifas esploros por comensi trovi la punctos che cius mes povon interconsenti. Ecede tiu chi numero aperon apartas listas de proponos por vozdonon – ne neglecten sendi ance la voas por estontas numeros.

La legantos pardonon, ce me scriban tie chi en reformajo anstate ciel avante en normala Esperanto. Se estan io en mea versio cio nolplezan, bonvolon informi pri tio – me serte faron la sama complezo al vo! Pardonon ance ce me ne starigin conto che UEA avant ol peti de vos cotizos. Pro obstina caprizo me insiste volin ce mesa UEA-codo comensen per la literos “novo”, sed ĉe UEA povan existi nur unu tia i lo yam existin, proprajo de cheka siruno [ĉe a sinjoro]. Lia afabla consento ce Novo prenen lia codo venin nur pos la aperigo de la dua numero, tiel ce me ne povin tiam proponi pago pere de UEA-conto. Nun eblan, tamen, i credeble eston ple fasila por pluras el vos pagi cotizos al la conto “novo-x” che la Centra Ofiseyo de UEA. Se vo ne havan mem conto tie i deziran informo pri ciel starigi iu, scriben al Novo, o al la CO de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

Ciel la plimulto el vos siyan, existan deziro ce Novo izen alizinta fac-asosio de UEA. Pos discuto cun ties directoros, montrizan ce almene por nun pli tauga selo estun rilato de “cunlaboranta” asosio, ya ce estan tre nolmultas plene alizintas asosios. Even por tiu selo, tamen, nesesan activas membros, i pro tio me bedauran esti curajiginta alizos de “observantoj”. Supezeble pro sentata prudento, o eble pro simpla hezitemo, pluras el la respondintos cotizin ciel observantos, anstate ciel membros. Tio ne nepre devan prezenti grava problemo, crom ce diversas el tius homos sendin tre bonas komentos i articolos – foye pli interesas ol tius senditas de la membros. A cio fari, do? La nuna politico estan ne aperigi contribuajos de nemembros (interalie cun la bona cialo ce observantos ne esten observatos), sed ya curajigi membrizo. A tio oni do faren: observantos . . . alizen!

La internazia alfabeto

Post studi zorge la proponojn de niaj samzelanoj kaj la mian propran, mi proponas la jenan sintezan solvon:

La alfabeto konsistas el la literoj *A B C D E F G H I J K L M N O P Q R S T U V W X Y Z*, sen akcentoj nek supersignoj. Por klarigo mi uzos la nova alfabeto per majuskulaj literoj kaj la antiqwa per literetoj.

Litero \hat{c} = C. Litero c = Z.

Litero \hat{s} = X. Tiu ci litero anstatawas ne nur al litero \hat{s} , sed ankaŭ al ciuj la paroj *ks* kaj *kz*. Ambau paroj devenas de la latina *x* kaj estas uzataj en la naziaj lingvoj per nur unu *x*. Estas ekzepto la vorto *ekzemo*, kiu devenas de la greka lingvo kaj devas resti sen xanyo. Kontrolu almenaŭ en via gepatra lingvo kaj vidos ke *ks* = X kaj *kz* = X ankaŭ.

Literoj \hat{g} kaj \hat{j} = Y, sono \hat{g} . Estas bezonata la neologismo *adyo* por anstatawi *aĝo* (prononzu ad-ĝo) por eviti la koinzidon kun la sufikso *aĝ* en kunmetitaj vortoj kiel *vinadyo* (vinaĝo, aĝo de la vino) kaj *vinayo* (vinaĵo, faritaĵo de vino).

La litero Q = k. Estos uzata nur por anstatawi la paron *kv* per QW. Tiu ci paro devenas de la latina *qu*, kaj estas nepronebla por granda parto de la esperantistoj, speciale kiam estas en la komenco de la vorto, kiel en *kvar*, *kvin*, *kvakero*, kaj multaj aliaj. Ekemplo:

Kvadrato estas: latine *quadratura*, portugale *quadratura*, hispane *cuadratura* (sama prononzo), france *quadrature*, angle *quadrature*, germane *quadratur*, ruse *kvadratura*, kaj lau mia propono esperante *quadrato*.

Kiu partoprenis en esperantaj kongresoj aŭdas al la kongresanoj por prononzi *kvar* tre diversajn sonojn kiel *ekvar*, *kavar*, *kuvar*, sed la plej ofte uzata estas la proponita *kŭar*. La instruistoj bone szias pri tio. En hispana lernolibro aperis en la dua lezio *unu*, *du*, *tri*, sed *kvar* kaj *kvin* aperas en posta lezio por ne formigim al la komenzantoj.

La litero ŭ kiam iras antaŭ vokalo estas W, sed post vokalo estas u, tial *antaŭ* sed *antaŭe*, *anstataŭ* sed *anstatawi*, kaj evitas malbelaj vortoj kiel povus esti *Eŭropo*, *antaŭ*, *automobilo*, ktp. U antaŭ vokalo estas u.

La litero K estas permesata de la Akademio por anstatawi ĉ en pluraj vortoj. Krome oni povas uzi la diagramon KH en vortoj, kie *k* sola kaŭzus konfuzon. Ekemploj: *ekho* = e' o, *kholero* = ' olero, *kboreo* = ' oreo.

La literoj G kaj J restas sen xanyo. Xanyi la

prononzo de Y kaj J povus esti pli alloga en finajoj, sed en komencoj farus vortoj kiel *yapano*, *yudo*, *yanuaro*, *yunio*, *yulio*, *Yesuo*, *Yozefo*, *Yohano*, *Yupitero*, ktp.; kaj ankaŭ oni devas alkitimiyi al la nova uzado de la du literoj.

Konzise: C = \hat{c} , X = \hat{s} , Y = \hat{g} kaj \hat{j} , Z = c, W = ŭ kaj u, QW = kv (prononzado vidu supren).

Mi pensas ke tiu ci propono, farita el aliaj proponoj, povas esti bona solvo al la nova alfabeto, sed oni bezonas toleremon, kiu bedaŭrinde ne estas tre abunda inter ni.

La xanyo de la litero *j* en finajoj per *i* prezentas gravaj problemoj, almenaŭ momente, car se oni konsideras ke *belai* estas diftongo, ankaŭ devas esti *balai*. Mi trovis, nur komenzante per la litero A, la sekvantajn verbojn: *adicii*, *adiawi*, *agonii*, *alglui*, *amnestii*, *anstatawi*, *antawi*, *atribui*, en kiuj la litero *i* iras post vokalo. Tio bezonos plian xanyojn, kaj mi pensas ke ni devas fari nur la nepre bezonatajn xanyojn.

Juan Navareño (Hispanio)

Mi skribas nur Esperante tiun tekston, ĉar mi ne sentas min preta je reformo. Tamen mi estas reformema!

Mia unua deziro estas bremsi kontraŭ novismoj kaj eĉ reiro al uzo de pli fundamentaj radikoj por esprimi novajn aferojn. Mi ne sentas bezonon multe klarigi tion. Tio estas laŭ spirito de la kreinto de nia lingvo. Mi tamen donos kelkajn ekzemplojn. Ni uzu *elektra fluo* anstataŭ *kurento*; *vagonaro* anstataŭ *trajno*; *subtera vagonaro* anstataŭ *metroo*; *forparolilo* anstataŭ *telefono*.

Mi estas kompisto (komputilisto). Tial, mi komprenas la problemon de supersignoj. Mi iam klarigis al konservemuloj, ke se iu kreus lingvon tian, ke ĝi ne uzeblus tra telefono, certe tiu lingvo ne estus akceptata, pro nepraktikeco en nia nuna mondo. Same estus pri lingvo ne skribebla sur papero (se ĝi postulus tridimensian reprezenton) aŭ pri lingvo, kies skriba formo bezonus plurajn kolorojn. Do same nun Esperanto estas nur iom tro nepraktika por aro da kompoj kaj, kio pli gravas, por aro de komprogramoj.

La propono uzi literon *h* (*ch*, *gh*, *hh*, *jh*, kaj *sh* anstataŭ \hat{c} , \hat{g} , \hat{j} kaj \hat{s}) estas laŭ mi interesa kompromiso, sed mi multe pli ŝatus anstataŭi jene: ĉ al *x*, \hat{j} al *q*, \hat{s} al *w*, ŭ al *y*, \hat{c} al *tw*, \hat{g} al *dq*.

Nun pri akuzativo. Esperanto estas konata

kiel bona traduka lingvo, ĉar eblas esprimi Esperante kun la etoso de la fonta lingvo. Zamenhofo kreis Esperanton laŭdire tiel, ke ĉiuj povu sin esprimi per kutimoj kiel eble plej similaj al tiuj de sia gepatra nacia lingvo. Tial gravas, ke la vortordo estu sufiĉe libera, kaj tial la bezono de akuzativo.

Ĝis nun bone, sed post jaroj da praktiko, mi ankoraŭ ofte eraras pri akuzativo kaj vidas la samon ĉe laŭdire tre lertaj esperantistoj. Mi konkludas, ke la ĉeloj de mia cerbo malfacile traktas du lingvojn tiom malsimilaj, kiom la franca, kaj la kunakuzativa Esperanto. Zamenhofo ne sukcesis ebligi min esprimi min sufiĉe laŭ la etoso de mia nacia lingvo.

Mi tamen devas konfesi, ke mi ne trovis solvon! Devigi vortordon tute ne helpus, ĉar tio estos nenatura por aliaj.

Alia utilo de akuzativo estas la eblo emfazi vorton. La emfazatan vorton oni metas unue en la frazo. Sed la plej kutima vortordo en Esperanto estas kun la subjekto unue. Kiel do emfazi la subjekton? Mi trovis interesan solvon: Anstataŭ uzi vortordon por emfazi, ni uzu la vorton *ja*. Ekzemple:

Mi manĝas, ja pomon.

anstataŭ *Pomon mi manĝas.*

Mi, ja manĝas, pomon.

anstataŭ *Manĝas mi pomon.*

Ja mi, manĝas pomon.

anstataŭ la neebla emfazo de la subjekto.

En la Kebekia vario de la franca lingvo, tiujn frazojn oni esprimas jene:

C'est une pomme, que je mange.

(Estas pomo, kiun mi manĝas.)

Je la mange, la pomme.

(Mi ĝin manĝas, pomon.)

C'est moi, qui mange une pomme.

(Estas mi, kiu manĝas pomon.)

En Kebekio, ofte esperantistoj uzas tiujn lastajn strangajn esprimojn eĉ en Esperanto, ĉar por ili estas nature. Eĉ alilandanoj, post kelkaj jaroj da lernado kaj parolado de nia etna lingvo, uzas foje tiujn formojn en Esperanto!

Kun mia propono uzi la vorton *ja* por emfazi, oni tamen bezonas akuzativon, por ebligi liberan vortordon, kiu rekreas etoson de fonta lingvo aŭ eĉ simple kreas eblecon fari plurajn etosojn, kiam oni verkas rekte en Esperanto. Mi do restas kun la problemo de malfacila lernado de akuzativo.

Patriko Monĵa (Kanado)

MEMBROJ

Itamar Alves Pinto, Rua Independência
101, Bairro Municipal, BR-34000-000
Nova Lima - MG, Brazilo

Luiz Galindo, Galegio

Hans-Dito Goeres, Viersener Str. 123,
D-W-4050 Monachoi-Gladbach 1,
Germanio

Manuel Halvelik, Gebroeders Blomme-
straat 41, B-2140 Antwerpen, Belgio

Pascal Lécaille, 138 avenue Saint-Exupéry,
F-69500 Bron, Francio

Roy McCoy, Bajonetstraat 78, NL-3014
ZL Rotterdam, Nederlando

Patriko Monĵa, 7491 avenue de Gaspé,
Montréal, Québec H2R 2A3, Kanado

Juan Navareño, Argumosa 24 2º G, E-
28012 Madrid, Hispanio

Ronald Nobel, p/a Meyhorst 17-52, NL-
6537 KE Nijmegen, Nederlando

Ed. Robertson, 52 Easter Drylaw View,
Edinburgh EH4 2QP, Skotlando

Mario L. Ruiz Karell, Ave. 45 No. 7404
% 74 y 76, Marianao 14, C. Habana
11 400, Kubo

Richard Stahl, 60-03 50th Avenue, Wood-
side, Queens NY 11377-5850, Usono

Willem Verloren van Themaat, Volkerak-
straat 38I, 1078 XT Amsterdam, Neder-
lando

Joachim Werdin, Pionierów 6 A 9, PL-47-
220 Kądzierzyn, Polando

OBSERVANTOJ

Detlev Blanke, Otto-Nagel-Strasse 110,
Pf. 113-05, D-O-1141 Berlin, Germanio

B. J. Edgecombe, 15 St. John's Avenue,
Hebburn, Tyne & Wear NE31 2TZ,
Britio

Walter Kobelt, Landquartstr. 81b, CH-
9320 Arbon, Svisio

Heinz Platzer, Bruenner Strasse 107-109/
2/1, A-1210 Wien, Aŭstrio

K. Riemersma, Postbus 10284, 1001 EG
Amsterdam, Nederlando

Thomas Wood, 4 Cherry Walk, Cheadle
Hulme, Cheadle, Cheshire SK8 7DY,
Britio

Esperanto shangjis iom de sia plumar, cai existas hodiau qelqiu novigo meliorantai tiun czi lingvon, cai je pligrandado en basa thesauro, cai szame je la scribo, tiel qve exp. neniuj super-signoi plu besonataz, qvio faciligas pressadon, edí simultane ne aspectigas sinbarema.

Tial la nomigo: ESPERANTO MODERNA.

Omniai aliai proponoi refalaz je longo ariér tiun czi variajjon en etymología ac grafiko.

La nova sinpresento de Esperanto malgrau czio tamen est do tiu de un lingvo bone legebla, cai gji ne subdonas difencilon de comprenado. Ocase ja oni devus aditi (cromdoni) qviel piednoton iun rimarqnon; nam ni cziuj ja aro interesitai epí la cresco de Esperanto al largie acceptebla lingvo universalá.

Sr. doctor Zamenhof mem expresse – en sia granda articul verqita sub pseudonym “UNIEL” (seqvum la Fundamento) scribintis, tio estas pre garau 100 jaroj, qve possible iam estonte ancorau ec-survenos iu melioraio fundamentale, sed qve la comencso-zton devas metatir. Cai en la comencsoi multo devas tenatir tiom facila qviom ain eble. Tial oni hodiau ne despectu la classican formon de Esperanto, ancau se nuntempe ja claras (1992), qve *qelqio* shangjenda est. Cetero oni ancau renconte novialain variantoin (-ial = sufix de plen-essenco, tutezzo) sin montru mentale aperta (exp. je LINGUNA). Gravas solmentau la maximum de comprenigo edí de acceptancso. Fine decidejn estos la tasco del homnaro tuta pri lingvo universa!

Sunbrilege claras, qve la nova Esperanto crom tio gjuste al la homnoi lontanaí al Esperanto, cai al novai legantoi en exterlando grandiose eclplazos, donite qve ja explicite pro sia etymología enriczidso ac legeblitato (-itat = sufix dusylaba cun simila signif qviel “-esso/-a”) faciliora en Occidentujo gji est immediate comprenebla al multe pli da homnoi, ancau al tiuj-lá, qvi ancorau neniam pre tio vidintaz Esperanton au ian alian variajjon de Lingvo Universalá! – Sempre pli multe da homnoi ac firmaoi ecz sin premaz epí tio, esti allargie representitaj en tiu lingvo nova, qvi est allargie recte-comprenebla cai tiom harmossa [= bela de ajiói], cun siai contribuaioi ac prospectar, cai tio ne solmentau reqva [= çar] oni speculazzas retrovi sin cun siai textoi en musear cai cultur-domar, qvio altigos la renomeon. . . .

Hans Dito Goeres (Germanio)

En mia preva artikolo en *Nova provo* mi indikis tri eblecojn des alfabeto. Unua estas esperanta alfabeto; dua estas \$ - ŝ, ç - ç, y - ŷ, q - ĝ, x - ˆ; w - ŭ; tria estas kun x, ekz.: sx - ŝ, cx - ç, jx - ĵ, gx - ĝ, bx - ˆ; w - ŭ.

Mi ankaw indikis kelkajn neologismojn por plibonigi an E.

Pri gramatiko mi volas skribi jenon: E. estas manka, konfuza, dubosenca, malfacila; E. povas kawzi akcidentojn. Por forigi cxion tion cxi, ni devas adopti neologismojn. Ekz.: por eviti akcidentojn ni alprenu kaj uzu *mal-vorto-anstatawajxojn*. Por forigi konfuzon ni alprenu kaj uzu prepoziciojn: *an, fa, des*.

Ni devas sxangxi, reformi nur tiujn necesajn partojn des E. Esperantistoj pli multe hontas paroli kaj diskuti pri neologismoj, ol aliaj homoj pri koitado kaj seksumado. Per diskutado pri neologismoj la neologismemuloj povus pruvi, ke ili pravus, ke la “necesaj” neologismoj estas vere tre necesaj.

Ekz. foje mi legis en *HdE*, ke *neksta* estas necesca. *HdE* uzas *venonta* anstataw *neksta*. Tio estas absurdajxo. Cxu mi povas diri an la jenaj? *Mi finis legi Heroldon, nun mi legos venontan Heroldon. Venonta paciento eniru al kuracisto. Mi volas flugi per venonta avio. Mia najbaro el venonta domo venis al mi.* Anstatawigu an la vorto *venonta* per *neksta* kaj cxio estos logika.

Post kiam mi pruvis, ke ne tawgas la jenaj vortoj: *venonta, sekva, sekvonta, sekvanta, proksima, plej proksima, posta* por la signifo des *neksta*, s-ro Eichholz foje skribis al mi, ke anstataw diri “kiam alvenos neksta avio” oni diru “kiam denove alvenos avio”. Tio estas sensencajxo, cxar estas granda diferenco inter “Mi volas denove flugi per avio” kaj “Mi volas flugi per neksta avio”. . . .

La neologismemuloj kaj reformemuloj devas alpreni kaj uzi la neologismojn. Ekz.: 1) Uzi an *mal-vorto-anstatawajxoj* kaj en E. kaj en Reformita E. Ekz.: *hati, impedi*. 2) Uzi an neologismoj kaj en E. kaj en Reformita E. Ekz.: *darfi, espekti, neksta, obteni*. 3) Uzi en Reformita E. an neologismoj, kiuj mankas en E., cxar la manko des neologismoj faras nian lingvon malfacila, konfuza, dubosenca. Ekz.: *an, fa, erst*. 4) Tamen, kiel skribis Z., ni ne sxangxu vortojn, ekz. *sxiþo* al *navo*. Nia Reformita E. estu E., sed nur pli bona, kiun ni nomu internaciezo.

Richard Stahl

La supersignitaj literoj

La problemo de la supersignitaj literoj ne estas facila solvi. La alfabeto ne apartenas al la dek ses reguloj, tamen al la fundamenta gramatiko. Do, por esti akceptita, la solvo devas esti ĝusta. La proponoj de UNA (Unuiĝo por Nova Alfabeto) kaj ties fondinto, J. W. Yung, estas malpli lerneblaj, kaj malpli logikaj, ol la originalaj supersignitaj literoj, ĉar oni devus rememori la liston da vortoj, en kiuj *k* ŝanĝiĝis al *q*, kiam anstataŭi *j* per *y* kaj kiam per *i* ktp.

La hoista propono, sugestita de Zamenhof mem, kaj subtenata de B. Edgecombe en la unua numero, signifas ke kelkaj sonoj estus reprezentataj de po du literoj (kaj ne la ĝustaj du literoj ĉiaokaze). Esperantistoj instinktive konstatas, ke hoismo estas paŝo malantaŭen, do ĝi neniam sukcesis.

Se la alfabeto estus ŝanĝata, estus sencecne reteni supersignitajn literojn, aŭ, eĉ plie, krei novajn. (La subhokigitaj literoj estis ŝerco, por fokusi atenton sur la problemo, ĉu?)

Por ke ŝanĝo en la alfabeto estu akceptata, ĝi devus konformi laŭ la plejparto de la jenaj kondiĉoj:

1. Ĉiu sono po unu litero.
2. Ĉiu litero po unu sono.
3. Neniom da supersignoj.
4. Simpla akcentad-regulo.
5. Ankoraŭ facile rekoneblaj radikoj.
6. Ĉiu fonemo nun uzata en la vortprovizoro devas esti ankoraŭ inkluzivita.
7. Minimume da ŝanĝo.

Solvo estus granda apogilo, kune kun kontraŭ-seksismaj reformoj, kaj etaj malstriktiĝoj de la gramatiko, por sukceso dum la dua jarcento de Esperanto. Ili ne garantias sukceson, kompreneble, ĉar la vera kampo de batalo estas aliloke.

Por Esperanto, elpensita dum erao kiam estis apenaŭ skribmaŝinoj, la supersignoj estis nura malhelpaĵo. Sed en erao de tekstprilabora softvaro, Esperanto riskas esti forlasita en la pasinteco.

Miaj proponoj do estas:

A. La supersignoj devas esti aboliciaitaj.

Se ni akceptas tion, kaj kondiĉojn 5 aŭ 6 aŭ 7 supre, tio signifas ke ni uzu kelkajn digramojn. Aritmetike neniam alia solvo estas ebla. Supraj kondiĉoj 1 kaj 2 ne povos esti do kontentigataj.

B. La digramoj, kiujn ni uzos, fariĝu per *b*.

Kelkloke mi vidis *x* uzatan kiel helpilon por fari digramojn, sed kondiĉo 5 ne estus

kontentigata. *Q*, *w* kaj *y* havus la saman malavantaĝon. Do ni faru ilin per *b*.

C. La dividstreko estu allasebla por ligi radikojn.

Por plirekonebligi situaciojn kie najbaraj literoj de du radikoj erare similas digramon, oni uzu dividstrekon. Pli ĝenerale, oni povus ankaŭ uzi divid-strekon por separi radikojn, kiam la kunformita vorto estas ne-ordinara.

D. La digramoj estu *ch*, *kh*, *sh*, kaj *zh* anstataŭ *ĉ*, *ĝ*, kaj *ĵ*.

Tiel la dua parto de la digramo havus difinitan fonetikan rolon. Kondiĉo 5 estus ankaŭ plimalpli kontentigita denove.

Se ni permesus ŝanĝojn de elparolo, la forigo de *ĉ* estus ankaŭ ebla, sed ni devus ankaŭ solvi la problemon de *korol'oro*, ktp. Ĉar ni devas chiaokaze uzi digramojn, ĝia forigo ne estas nepre deviga.

Oni povus aŭ trakti la digramojn kiel apartajn literojn, kiam oni konsideras la ordigan sekvon (kiel en la hispana), aŭ ne, laŭvole. Sed kiam oni nombras alfabeto, kiel ĉi-tie, oni uzu nur monogramojn.

E. Ni uzu *j* anstataŭ *ĝ*, . . .

Uzi *dzh* anstataŭ *ĝ* estus fonetike pli logika, sed peza, kaj ne kontentigus kondiĉon 5. *Q* estas la plej taŭga el la ceteraj literoj, sed neniu etna (aŭ konstruita) lingvo, kiun mi konas, uzas *q* en tiu rolo. *J* ludas tiun rolon en la angla, tamen.

. . . kaj *y* anstataŭ *j*.

Bedaŭrinde, *j* estas yam uzata. *Y* estas rekonebla, kay ne uzata, do povas surprizen tiun rolon. La uzado de *i* kaŭzus tro da malfacilazhoj en la elparolad-reguloy.

F. Ni uzu *w* radik-komence, kay *u* aliloke, anstataŭ *ŭ*.

Uzi *w* chie estus peze, kay konfliktus iom kun kondiĉo 5. Ni konservu laueble la normalan elparoladon, do ni diru ke *u* retenas sian kutiman vokalan elparoladon, krom en kombino *au*, kiam ji estas elparolata konsonante. Aliloke por sendubigi indikon de konsonanteco, ekz. radik-komence, oni uzu *w*, kiel en *wato* (antaue *ŭato*).

La kombinoj *eŭ* kaj *oŭ* malofte kauzas malfacilazhojn, se ni elparolus ilin chiam 'eu'/'ou', do ni faru tion.

G. Al radikoy finijantay per *a*, ni aldonu *y*.

Unu problemo estas ke la kombino *au* ne chiam signifas *aŭ*, t.e. en radikoy finijantay per *a*, ekz. *bala-*. Por ke la akcento dauru fali

sur la sama silabo, kay por ke la regulo pri akcentado ne estiju tro komplika, oni aldonu y al chiuy tiay radikoy. Ekzemple, *bala-* igu *balay-*; do, *balayi*, *balayilo*, *balayu*, ktp.

H. Kay tiel plu.

Estas kelkay pluay reformoy al la alfabeto kay elparolado, kiuy n aliaj eble proponus, ekzemple:

i) Enkonduki la literon *x* anstataŭ *ks* kay *kz*, kie tio estas jenerale uzata internacie. Ekzemple, en *exemplo*.

ii) Simile enkonduki la digramon *qu* anstataŭ *kv*, exemple *qualito* (kun au sen shanji la elparoladon).

iii) Anstataŭigi *c* per *ts* radik-komence kay radik-meze kiam ji estas sequata de *a*, *o* au *u*, pro la kialo, ke la radikoy estijus pli rekoneblaj. Exemple, *caro* iĵus *tsaro*.

iv) Plifaciligi la elparoladon en konsonant-kombinoj, precipe kie *c* estas inkluzivita. Tie oni diru ke ne gravas, se *funkcio* estas elparolata kiel “funksio”, au *scias* kiel “cias”. Sed la literumado de tiuj vortoy povus esti konservata.

Mi mem estus nek forte por nek kontraŭ ili. Mi mencias ilin nur por provoki debaton. Ili tute ne estas unuaviciay antauecoy, kay povas atendi, au ech manki. Unue ni devas forigi la supersignoy n, kay varbi sufiche da subtenantoy por fari tion.

Ed. Robertson (Skotlando)

Alfabeto, skribado kaj prononco

La alfabeto de la lingvo Hipersigno (HS) egalas al la latina alfabeto, kun la literoj prononcataj preskaŭ egale al tiuj de Esperanto, kiel difinite en la suba listo.

LITERO PRONONCO

A, a	<i>a</i> de <i>animo</i> , <i>amo</i> , <i>alta</i>
B, b	<i>b</i> de <i>bovo</i> , <i>bebo</i> , <i>bela</i>
C, c	<i>c</i> de <i>celo</i> , <i>cent</i> , <i>circlo</i>
D, d	<i>d</i> de <i>damo</i> , <i>danci</i> , <i>devi</i>
E, e	<i>e</i> de <i>estas</i> , <i>ebeno</i> , <i>eterna</i>
F, f	<i>f</i> de <i>fali</i> , <i>for</i> , <i>fajro</i>
G, g	<i>g</i> de <i>gaja</i> , <i>gasto</i> , <i>glacio</i>
H, h	<i>h</i> de <i>havi</i> , <i>hela</i> , <i>hundo</i>
I, i	<i>i</i> de <i>io</i> , <i>ideo</i> , <i>ili</i>
J, j	<i>ĵ</i> de <i>ĵaluzo</i> , <i>ĵeti</i> , <i>ĵurnalo</i>
K, k	<i>k</i> de <i>kafo</i> , <i>kaj</i> , <i>kelka</i>
L, l	<i>l</i> de <i>laboro</i> , <i>lampo</i> , <i>ligno</i>
M, m	<i>m</i> de <i>magio</i> , <i>majstro</i> , <i>mielo</i>
N, n	<i>n</i> de <i>nacio</i> , <i>nazo</i> , <i>nokto</i>
O, o	<i>o</i> de <i>osto</i> , <i>onklo</i> , <i>okulo</i>

P, p	<i>p</i> de <i>pagi</i> , <i>patro</i> , <i>pilo</i>
Q, q	<i>ks</i> de <i>ksenofobo</i> , <i>ksenono</i> , <i>kserografio</i> . Tiuj vortoj, en HS, skribiĝas kiel <i>qenofobe</i> , <i>qenone</i> , <i>qerografio</i> .
R, r	<i>r</i> de <i>regi</i> , <i>rekta</i> , <i>rompi</i>
S, s	<i>s</i> de <i>salo</i> , <i>sankta</i> , <i>sidi</i>
T, t	<i>t</i> de <i>tempo</i> , <i>tenera</i> , <i>tipo</i>
U, u	<i>u</i> de <i>urbo</i> , <i>uzi</i> , <i>urso</i>
V, v	<i>v</i> de <i>vivo</i> , <i>vango</i> , <i>varma</i>
W, w	<i>ŭ</i> de <i>fraŭlo</i> , <i>naŭ</i> , <i>neŭtrala</i> . Tiuj vortoj, en HS, skribiĝas kiel <i>frawle</i> , <i>naw</i> , <i>newtrala</i> .
X, x	<i>ŝ</i> de <i>ŝtono</i> , <i>ŝi</i> , <i>ŝerci</i> . Tiuj vortoj, en HS, skribiĝas kiel <i>xtone</i> , <i>xi</i> , <i>xerci</i> .
Y, y	<i>j</i> de <i>kaj</i> , <i>hejmo</i> , <i>juna</i> . Tiuj vortoj, en HS, skribiĝas kiel <i>kay</i> , <i>heyme</i> , <i>yuna</i> .

Z, z *z* de *zorgi*, *zebro*, *zono*

Rimarko: La literoj *ĉ* kaj *ĝ* de Esperanto korespondas, en Hipersigno, al la literaj duopoj *tx* (*ĉ*) kaj *dj* (*ĝ*). Ekzemple, la Esperantaj vortoj *ĉielo*, *ĉapelo*, *ĉevalo* korespondas al *txiele*, *txapele*, *txevalo*. La Esperantaj *ĝui*, *fariĝi*, *ĝemelo* korespondas al la Hipersignaj *djui*, *faridji*, *djemele*. La litero *ĥ* de Esperanto, kiel en *eĥo*, ne havas korespondon en Hipersigno. Kaj la Esperanto vorto *eĥo*, ekzemple, fariĝas *ehe* en Hipersigno.

La nomoj de la Hipersignaj literoj estas: a, be, ce, de, e, ef, ge, ha, i, jot, ka, el, em, eni, o, pe, qe, er, es, te, u, ve, duobla ve, xis, ipsilone, ze.

Sekvante ni donas kelkajn Hipersignajn vortojn, kun iliaj prononcoj figuritaj en Esperanto inter krampoj.

Ame [ame], *vive* [vive], *pace* [pace], *honesta* [honesta], *tekte* [tekste], *eqprezidante* [eksprezidante], *jaluze* [jaluze], *jurnale* [jurnale], *hawte* [haŭte], *newtrone* [neŭtrone], *krayone* [krajone], *yudji* [juĝi], *yare* [jare], *skribi* [skribi], *djibe* [ĝibe], *djerme* [ĝerme], *djove* [ĝoje], *subidji* [subiĝi], *xayni* [ŝajni], *xandji* [ŝanĝi], *xveli* [ŝveli], *xviti* [ŝviti], *tatxmente* [taĉmente], *txe* [ĉe], *txi* [ĉi], *etx* [eĉ], *txasi* [ĉasi], *txasta* [ĉasta], *txu* [ĉu], *txarma* [ĉarma].

Kiel en Esperanto, ankaŭ en Hipersigno la akcento falas sur la antaŭlasta silabo, escepte por la substantivoj en kiuj oni elizias ilian lastan vokalon, la vokalon e. Tiuj do fariĝas “oksi-tonaj”. La silaboj karakteriziĝas per la enhavo de unu vokalo. La vokaloj estas *a*, *e*, *i*, *o*, *u*. La ceteraj literoj estas konsonantoj.

Itamar Alves Pinto (Brazilo)

Ne reformo de Esperanto, ma nova planlingvo

Eks omni artikulos in le unimi numero de *Nova provo*, le maksim akseptabili sea to de Basil Edgecombe, juste per kwe it sea le desmaksim radikali. Fakte, eks omni projektos de Esperanto reformati sole projekto de reformo de sole le ortografio per abfiko de l' supersignos habea chanco sukcesar, ne per kwe le supersignos wude sea le soli eroro de Esperanto, ma per kwe les sea le soli detaylo in Esperanto abfikabili sen kompleta destrukto de l' Esperanti kulturo.

Zamenhof permiteva in le anteparolo de l' Fundamento de Esperanto kambir la Fundamento kazue de oficiali introduceo. Ma ultra sui kvalitatos lingwistiki Esperanto habea kwale maksim grandi avantajo super le alteri planlingvos sui kulturo. Pro akseptars kwale mondlingwo, planlingwo debea pruvar kontentifikante pro le vasti publiko e l' elito kulturali sui plenvaloritato kwale kulturlingwo. Planlingwo kon certi kulturo donk sea reformabili sole in le traytos reformabili sen kompleti destrukto de iti kulturo. Nu, le ortografio de lingwo sea reformabili sen tali destrukto. Le rusezi ortografio reformavas suffice draste post le Rusa Revolucio: tande interaltere abfikavas kelki literos eks le cirili alfabeto. Omnunu – od ruso od alterlandano – kwi nunk lekta eksemple Tolstoy od Dostoyevski in le originalo, donk ne lekta les in le ortografio kwi les auto uzava. E li rusezi kulturo postviveva ti reformo ortografii. Post la Rusa Revolucio apareva interaltere le belisimi poemas de Mayokovski e Pasternak. Kwe le rusi literaturo post le Rusa Revolucio ne atingeve le nivelo de l' decinonimi anuenco, kauzas probable ne bay le reformo ortografii.

Kontrae, reformo de l' wordaro e gramatiko de lingwo ne sea possibili sen kompleti destrukto de iti kulturo. Kalocsay in ortografio reformati sen supersignos wude sera ankore Kalocsay. Kalocsay in “Esperanto” reformati sen akuzativo ne plus wude sera Kalocsay. Le abfiko de l' akuzativo wude postularaambio de l' sistemo por distingur le subjekto e l' objekto, certe kon minus liberitato in le vicordino de subjekto, predikato e objekto. Traduceo de poemas de Kalocsay in tali “reformati Esperanto” wude postulara tanti kambios in le teksto, ofti kambios de l' vicordino de l' wordos, possibile ofti transformos de aktivi frazos in pasivis (segun Marie D'Hane-Scheltema, ganitoreso de l' prestiji Nijhoffpremio pro traduceo de

Ne reformo de Esperanto, sed nova planlingvo

El ĉiuj artikoloj en la unua numero de *Nova provo*, la plej akceptebla estas tiu de Basil Edgecombe, ĝuste ĉar ĝi estas la malplej radikala. Fakte, el ĉiuj projektoj de reformita Esperanto nur projekto de reformo sole de la ortografio per forigo de la supersignoj havas ŝancon sukcesi, ne ĉar la supersignoj estus la sola eraro en Esperanto, sed ĉar ili estas la sola detalo de Esperanto reformebla sen kompleta detruo de la Esperanta kulturo.

Zamenhof permesis en la antaŭparolo de la Fundamento de Esperanto ŝanĝi la Fundamenton kaze de oficiala enkonduko. Sed krom siajn kvalitojn lingvistikajn Esperanto havas kiel plej grandan avantaĝon super la aliaj planlingvoj sian kulturon. Por esti akceptita kiel mondlingvo, planlingvo devos pruvi kontentige por la vasta publiko kaj la kultura elito sian plenvalorecon kiel kulturlingvo. Planlingvo kun certa kulturo do estas reformebla nur en la trajtoj reformeblaj sen kompleta detruo de ĝia kulturo. Nu, la ortografio de lingvo estas reformebla sen tia detruo. La ortografio de la rusa lingvo estis reformita sufiĉe draste post la Rusa Revolucio: tiam interalie estis forigitaj kelkaj literoj el la cirila alfabeto. Ĉiu – aŭ ruso aŭ alilandano – kiu nun legas ekzemple Tolstoj aŭ Dostojevski en la originalo, do legas ilin ne en la ortografio kiun ili mem uzis. Kaj la ruslingva kulturo transvivis tiun ortografian reformon. Post la Rusa Revolucio aperis interalie la belegaj poemoj de Majakovski kaj Pasternak. Ke la rusa literaturo post la Rusa Revolucio ne atingis la nivelon de la deknaŭa jarcento, tion kaŭzas verŝajne ne la ortografia reformo.

Male, reformo de la vortaro kaj gramatiko de lingvo estas neebla sen kompleta detruo de ĝia kulturo. Kalocsay en ortografio reformita sen supersignoj ankoraŭ estus Kalocsay. Kalocsay en Esperanto reformita sen akuzativo ne plu estus Kalocsay. La forigo de la akuzativo postulus ŝanĝon de la sistemo por distingi la subjekton kaj la objekton, certe kun malpli da libereco en la vicordo de subjekto, predikato kaj objekto. Traduko de poemoj de Kalocsay en tian “reformitan Esperanton” postulus tiom da ŝanĝoj en la teksto, oftaj ŝanĝoj de l' vortordo, eble oftajn transformojn de aktivaj frazoj en pasivajn (laŭ Marie d'Hane-Scheltema, gajnintino de la prestiĝa Nijhoffpremio por

literaturo in od eks Nederlandezo, le maksim boni tradueco Nederlandezi de komencobjekti frazos Latini od grekezi sea ofte pasivi frazos), probable anke multi alteri transformos, kwe le rezulto esencie ne wude habera multe plus komuni kon Kalocsay kwam eksemple boni anglezi tradueco de Kalocsay.

Tare omni planlingvaŭtoros pensanti in terminos de “reformar Esperanto” ultra per reformo de l’ ortografio esencie sidea inter dui stulos: les destrukta le tote kulturo de Esperanto e tare ne atingeas le Esperantistos sentinti su ligati ad Esperanto per iti kulturo, e les konserva tro multi traytos de Esperanto *sole* per kwe les trovas in Esperanto e tare ne atingeas le antropos, tale ekesperantistos kwale alteris, kwi postula de l’ traytos de planlingvo justifikato alteri kwam kwe les trovas in Esperanto. Ti ultimi punkto sea ilustrabili even per Ido, kwi transprendevas de Esperanto le finajos verbi *as, is, os, ant, int, ont, at, it, ot* esencie *sole* per kwe les trovas in Esperanto. Poste De Beaufront in *Kompleta gramatiko detalozas dil linguo internaciona Ido* (p.206-207) argumentos longi, serchati e desmulte konvincenti pro justifikar les.

Demando tote alteri sea, li Esperanto habea valori konstrukti principios. Esperanto efektive habea dui valori konstrukti principios: le fonemi ortografio e le liberi kombinado de senkambiĵ morfemos kon fiksati signifikos. Me efektive denove esayava kompozir planlingvo segun ti principios. Efektive in sui bazi morfologii strukturo mei planlingvo sea multe simili ad Esperanto e ekstraario lektanti mei libro de it, ne kogninti me, plus wude inklinar konsiderar it kwale le laboro de Esperantisto kon boni kognio de Interlingua kwam de Interlinguaisto kon boni kognio de Esperanto. Ma in le elekto de l’ morfemos me ducevas precipue bay l’ principio de maksimuma internacianitato, e konsultava generale plus Ido e Interlingua kwam Esperanto.

Frapanti sea in le unimi numero de *Nova provo*, kwe ni konlaboranto menciona le altere planlingvos, sole Halvelik menciona le naturalismo generale. Ma boni kognio de l’ chefi alteri planlingvos (minimume Ido, Occidental, Novial, Interlingua, Glosa) sea absolute necesi pro omni planlingvaŭtoro nunk volenti konsiderars serioze, precipue per kwe l’ seriozi diskusado de l’ kriterios de wordari internacianitato komencivas sole post le publikifiko de Esperanto.

Willem Verloren van Themaat (Nederlando)

traduko al aŭ el la nederlanda lingvo, la plej bona traduko de komencobjekta latina aŭ greka frazo en la nederlandan lingvon estas ofte pasiva frazo), verŝajne ankaŭ multajn aliajn transformojn, ke la rezulto esence ne havus multe pli komune kun Kalocsay ol ekzemple bona angla traduko de Kalocsay.

Tial ĉiuj planlingvaŭtoroj pensantaj en terminoj de “reformi Esperanton” krom per reformo de la ortografio esence sidas inter du seĝoj: ili detruas la kulturon de Esperanto kaj tial ne atingas la esperantistojn sentantajn sin ligitaj al Esperanto pro ĝia kulturo, kaj ili transprenas tro multajn trajtojn de Esperanto *nur* ĉar ili troviĝas en Esperanto kaj tial ne atingas la homojn, tiel ekesperantistojn kiel aliajn, kiuj postulas por la trajtoj de planlingvo pravigojn aliajn ol ke ili troviĝas en Esperanto. Tiu lasta punkto estas ilustrebla eĉ per Ido, kiu transprenis de Esperanto la verbajn finaĵojn *as, is, os, ant, int, ont, at, it, ot* esence nur ĉar ili troviĝas en Esperanto. Poste De Beaufront uzis in *Kompleta gramatiko detalozas dil linguo internaciona Ido* (p.206-207) argumentojn longajn, serĉitajn kaj malmulte konvinkajn por pravigi ilin.

Tute alia demando estas, ĉu Esperanto havas valorajn konstruprincipiojn. Esperanto efektive havas du valorajn konstruprincipiojn: la foneman ortografion kaj la liberan kombinadon de senŝanĝaj morfemoj kun fiksitaj signifoj. Mi efektive denove klopodis kompili planlingvon laŭ tiuj principioj. Efektive en sia baza morfologia strukturo mia planlingvo estas tre simila al Esperanto, kaj eksterulo leganta mian libron pri ĝi ne konante min pli emus konsideri ĝin kiel la verkon de esperantisto kun bona kono de Interlingua ol de Interlingua-isto kun bona kono de Esperanto. Sed en la elekto de la morfemaj min gvidis precipe la principio de la maksimuma internacieco, kaj mi konsultis ĝenerale pli Idon kaj Interlinguan ol Esperanton.

Frapas en la unua numero de *Nova provo*, ke neniu kunlaboranto mencias la aliajn planlingvojn, nur Halvelik mencias la naturalismon ĝenerale. Sed bona kono de la ĉefaj aliaj planlingvoj (minimume Ido, Occidental, Novial, Interlingua, Glosa) estas nepre necesa por ĉiu planlingvaŭtoro kiu nun volas esti konsiderata serioze, precipe ĉar la serioza diskutado de la kriterioj de vortara internacieco komenciĝis nur post la publikigo de Esperanto.

Willem Verloren van Themaat (Nederlando)